

# LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la  
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)  
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.  
Limdato por artikoloj: la 1-a de ĉiu para monato.  
Jarkolekto 4, n-ro 1 (19): majo-junio 2011.  
Antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ekde  
la 13-a numero ( majo 2010).  
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,  
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47  
Retadreso: [pieter-jan.doumen@telenet.be](mailto:pieter-jan.doumen@telenet.be)

## Redaktore...

*Karaj Gelegantoj,*

*Per tiu ĉi 19-a numero ni jam komencas la kvaran eldonjaron de nia revuo. La lastan numeron ni sendis al 224 gelegantoj: 23 belgaj esperantistoj sen retaliro ricevis ĝin per la papera poŝto, kaj 201 esperantistoj precipe en Belgio kaj Nederlando, sed ankaŭ kelkaj en Germanio, Pollando, Japanio kaj Vjetnamio ricevis ĝin retpoŝte. La revuo estas senpaga por ĉiuj esperantistoj ĉie en la mondo kiuj disponas pri retaliron. Nur en Belgio ni povas sendi ĝin ankaŭ paperpoŝte, ĉar ĉi tie ni profitas de la speciala tarifo por revuoj.*

*Ĉiu rajtas plusendi aŭ fotokopii nian revuon por havigi ĝin al aliaj gesamideanoj. Aliflanke ni ne volas trudi ĝin al iu ajn. Se vi ne (plu) ŝatas ricevi ĝin, sendu al ni mallongan mesaĝon por informi nin pri tio.*

*Ankoraŭ nun ni regule ricevas mesaĝojn de gelegantoj por gratuli nin pro la iniciato kaj la kvalito de la revuo. Koran dankon al ili.*

*Nia celo estas kaj restas liveri al niaj gesamideanoj interesan legaĵon en bona lingvo. La temoj de la artikoloj estas duspekcaj: unuflanke ni volas skribi pri la Esperanta mondo kaj aliflanke pri interesaj aferoj en la ekstera mondo, sed ne pri religio aŭ partipolitiko, tiklaj temoj kiuj nur dividus nin.*

*Cetere ni volas ankaŭ defendi la internan ideon de Esperanto, kiu laŭ ni estas la motoro kaj la animo de la movado. Sen ĝi Esperanto estas malplena skatolo. Esperanto estas la pakumo de nia idealo: pli bona kaj justa mondo por ĉiuj popoloj ie ajn en la mondo. Ni firme kredas, ke Esperanto ne estas celo en si mem, sed unu el la rimedoj atingi tiun celon. Sed ni respektas ĉies opinion.*

*Ankoraŭ ĉi-foje mi deziras al vi agrablan legadon kaj ĉion ajn bonan en via vivo!*

*Pieter Jan Doumen*

## Antaŭparolo de la Unua Libro (5) (Voorwoord tot het Eerste Boek) (5)

### III

Per tio mi finas la analizon de la plej gravaj kvalitoj de mia lingvo; mi montris kian facilecon ĝi havas ofertenda al iu kiu lernas ĝin; mi montris, ke ĝia sukceso ne dependas de la sinteno de la socio kontraŭ ĝi, ke ĝi havas efektive la rajton nomiĝi lingvo internacia, eĉ se neniu en la mondo iam volis aŭdi pri ĝi; ke ĝi vere donas al ĉiuj kiuj lernas ĝin, la eblecon komprenigi sin al persono de iu ajn nacio, almenaŭ se tiu persono faris studojn.



D-ro L.L.Zamenhof en 1894

Sed mia lingvo posedas ankoraŭ alian celon: ne kontenta pri ĝia *internacieco*, ĝi ankaŭ devas fariĝi *universala*, t.e. atingi, ke la plimulto de la edukita mondo povu flue paroli ĝin. Kalkuli je la subteno de la *socio* por atingi tiun celon, signifus starigi konstruaĵon sur la plej ŝanceliĝema kaj fantazia fundamento, ĉar la plimulto de la socio ne ŝatas subteni ion, sed volas, ke oni donacas al ĝi ĉion tute preta. Tial mi provis trovi rimedojn atingi tiun celon sendepende de la subteno de la socio. Unu el tiuj rimedoj, kiun mi detale eksplikas ĉi tie, estas io kiel universala voĉdonado.

Se ĉiu el la legantoj bone pensus pri tio kio estas eksplikita ĉi-supre, ĉiu devus veni al la konkludo, ke la scio de la Lingvo Internacia estas por li senkondiĉe utila kaj kompensas pli

ol sufiĉe la malgrandan klopodon lerni ĝin; sekve mi povus atendi, ke jam ekde la komenco tutaj amasoj da homoj akceptos la lingvon. Sed ĉar mi prefere deziras prepari min al nefavora akcepto, ol lasi min kuntreni de rozkoloraj atendoj, mi cedas, ke dum la unuaj tempoj tre malmultaj tiaj homoj estos trovataj, ke tre malmultaj homoj trovos en mia lingvo por si mem *sufiĉan utilecon*, kaj ke neniu volos oferi eĉ unu horeton pro *principo*; ke enorma kvanto de miaj legantoj ne dediĉos atenton al la afero, aŭ, ĉar ili dubas, ĉu ilia klopodoj estos iagrade rekompencitaj, ili ne povos decidi proprigi al si mian lingvon pro timo, ke iu nomu ilin revuloj (nomo pri kiu en nia tempo hontas la plej multaj homoj). Kio necesas por konvinki tiun ĉi enorman amason da indiferentuloj kaj hezitemuloj lerni la Lingvon Internacian?

Se ni povus rigardi en la koroj de ĉiu el tiuj indiferentuloj, ni vidus jenon: neniu estas kontraŭ la enkonduko de internacia lingvo; kontraŭe ĉiu estus feliĉa pri tio; sed li ja dezirus, ke subite, iun belan matenon, la plimulto de la instruitaj homoj sciu tiun ĉi lingvon *sen la plej malgranda peno aŭ la plej malgranda ofero siaflanke*; tiam eĉ la plej indiferenta persono kompreneble rapidus lerni tiun ĉi lingvon, ĉar bedaŭri tiam la tre malgrandan klopodon lerni lingvon kiu posedas la supre menciitaj kvalitoj kaj kiun la plimulto de la instruitoj jam posedas, estus *ekstreme stulte*.


Sen postuli de iu ajn la plej malgrandan pioniran laboron por donaci al la socio ĉion preta, sed tamen atingi, ke, sen la plej malgranda klopodo aŭ la plej malgranda ofero, iun bonan matenon grava parto de la edukitoj lernu la Lingvon Internacian aŭ publike promesu lerni ĝin, mi procedas jene:

Tiu ĉi broŝuro estos disvastigata tra la tuta mondo. Sen peti iun lerni tiun ĉi lingvon aŭ fari ion alian kio kostas penon, tempon kaj monon, mi petas ĉiun leganton unu momenton preni skribilon, plenigi unu el la aldonitaj formularoj kaj sendi ĝin al mi. La enhavo de tiu formularo estas jeno:

“Mi, subskribinto, promesas lerni la internacian lingvon proponitan de D-ro Esperanto, se aperos, ke dek milionoj da homoj publike promesos fari la samon.”

Sekvas subskribo kaj stampo<sup>1</sup>, kaj sur la malantaŭa flanko de la formularo li klare skribu

<sup>1</sup> Personoj kiuj mem ne posedas stampilon, povas anstataŭigi ĝin per stampo de aliulo, kiu en tiu kazo garantias la autentecon de lia subskribo.



sian kompletan nomon kaj ĝustan adreson. Iu kiu principe havas ion kontraŭ internacia lingvo, bonvolu sendi la menciitan formularon kun trastreka teksto kaj la mencio “*kontraŭ*”. Aliflanke tiuj kiuj deziras *ĉiaokaze* lerni la lingvon sendepende de la nombro de la senditaj promesoj, trastreku la duan duonon de la teksto kaj anstataŭigu ĝin per “*senkondiĉe*”.

La subskribo de la menciita promeso ne postulas la plej malgrandan penon, kaj eventuala fiasko de la afero ne devigas al tio; ĝi devigas lerni la lingvon nur en la kazo, kiam dek milionoj da aliaj edukitoj lernos ĝin; sed tiam tio ne postulos oferon flanke de la subskribinto, sed aferon kiun li tuj plenumos sen ia ajn devigo. Intertempe ĉiu subskribinto, sen oferi ion personan, helpos pli rapide plenumi malnovan revon de la homaro.

Se la nombro de la senditaj subskriboj atingos dek milionojn, ĉiuj nomoj kaj adresoj estos publikigitaj en speciala libro, kaj en la mateno post la apero de la libro evidentiĝos, ke dek milionoj aŭ pli da homoj devigis sin unuj kontraŭ la aliaj lerni la Lingvon Internacian, - kaj la problemo estos solvita.

Kolekti subskribojn oni povas por io ajn, sed ne estos trovitaj multaj volontuloj por doni sian subskribon, kvankam temas pri la plej subluma kaj utila afero; sed se tiu subskribo, kiu proksimigas la realigon de grandioza idealo, postulas de la subskrinto absolute nenian materian aŭ moralan oferon, ni estas plene rajtigita esperi, ke *neniu* rifuzos doni sian subskribon. Ĉar en tiu kazo rifuzo estus ne nur kontraŭ la ĝenerala utileco, se eĉ krimeca, ne nur negliĝa sinteno kontraŭ la ĝenerala bonfarteco, sed intenca kontraŭago; rifuzo en tiu kazo povus esti eksplikita nur per timo de iu ajn aristokrato de sango, scienco aŭ mono vidi sian nomon lokita

apud tiu de persono kiu staras pli malalte ol li sur la socia eskalo. Sed mi permesas al mi esperi, ke troveblos malmulte da homoj kiuj decidus, pro tia vanta orgojlo, bremsi gravan ĝenerale humanan aferon. Ne povas esti dubo pri tio, ke neniu povas kontraŭi la enkondukon de internacia lingvo; se iu ne aprobas la Lingvon Internacian pro la fakto, ke ĝi estas proponata de mi, li sendu proteston kune kun la menciita promeso; sed aŭdigi ian ajn voĉon pri tiu ĉi afero estas la devo de ĉiu edukita homo de ĉia ajn aĝo, sekso kaj rango, tiom pli ke aŭdigi tiun voĉon postulas nur kelkajn minutojn por plenigi la menciitan formularon kaj kelkajn kopekojn por poŝtmarkoj.


Sen pravigo antaŭ la socio restos do tiuj homoj, kies nomoj ne aperos en la libreto de la voĉdonado nek en la listo de tiuj kiuj faris la promeson, nek inter tiuj kiuj formulis objektojn. Neniu esperu pravigi sin per la vortoj, ke “li ne aŭdis” pri la propono de la voĉdonado, ĉar ĉiuj aranĝoj estos faritaj por informi ĉiujn pri ĝi. La redakciojn de ĉiuj gazetoj kaj ĵurnaloj mi petos publikigi mian alvokon; ĉiun apartan gravan personon mi petos diskonigi mian proponon inter siaj amikoj kaj konatoj.

(D-ro Zamenhof, trad. P.J.D.)

## Rezisto al la angla kreskas (2) (Weerstand tegen het Engels groeit)(2)

Ankaŭ en Germanio oni malkovras, ke la angla povas esti handikapiga. La fama germana firmao Porsche ankaŭ preferas bonan germanan al malbona angla. La germana gazeto *Süddeutsche Zeitung* de la 15-a de oktobro 2010 skribas: “La konstruisto de la sportveturiloj Porsche uzas la germanan por siaj internaj rilatoj. Ĝia uzado kreskigas la inventemon de la inĝenieroj kaj la kvaliton de la interŝanĝoj dum kunvenoj. Inverse, ekscesa uzado de la angla perturbas la laboron, kiam tiuj kiuj esprimas sin, ne estas tiuj kiuj plej kompetentas por respondi, sed tiuj kiuj plej bone regas la anglan. La sistema uzado de la germana ĉe Porsche konsistigas la ĉefan kialon de ĝia sukceso. Kiel lingvistoj kaj konsilantoj de la entrepreno konstatis, la angla aspektas fakte kiel handikapo, kaj tio je pluraj niveloj:

- blokita kunlaborantoj, kiuj ne plu esprimas sin dum kunvenoj.
- malprecizeco de la tradukado pri punktoj, kies kompreno estas gravega;
- malrapidigo kaj eĉ haltigo de la laborprocezo, kiam nur la kunlaborantoj regantaj la anglan



sukcesas esprimi sin, dum ili ne nepre estas specialistoj pri la demando;

- ne pritraktitaj dosieroj, ne plenumitaj misioj pro manko de sufiĉa kompreno de la enhavoj;
- sed ĉefe: la angla ĝenas la imagon kaj inventemon de la inĝenieroj, t.e. tiujn fakultojn kiuj konsistigas la forton de la entrepreno...

(Henri Masson, Francio)

## Novajoj el Esperantolando

(Nieuws uit Esperantoland)

Ĉinio: La Ĉina Radio Internacia evoluas –

Okazis klara kaj pozitiva evoluo en la rilatoj de la juna Esperanto-redakcio de la Ĉina Radio Internacia kun la aŭskultantaro kaj spektantaro, kaj krome en la enhavo de la programoj, ĉar efektive la redakcio produktas nun videojn por pliriĉigi siajn programojn, kiuj estas tre riĉaj kaj variaj, kaj povas esti regule ricevataj per simpla peto al la redakcio per ĝia retejo <http://esperanto.cri.cn/radio/video/htm>. Por tio estas necese elŭti la programaldonon “plugin” aŭ VLC.

(Henri Masson, Francio)

Usono: Esperanto-reklamo ĉe Google –

Lige kun la 10-jariĝa festo de sia sistemo *AdWords* la firmao Google produktis filmeton por siaj elstaraj klientoj, kiuj elspezas por ĝi super iu limo.

Ankaŭ nia “Esperanto-Centro Eventoj” en Budapeŝto apartenas al tiuj reklamistoj, kaj Google nun produktis iun filmeton, kiu tre impresas reklamas Esperanton, pli ĝuste nian retejon [www.eszperanto.hu](http://www.eszperanto.hu). La filmeto estas parolata angle kaj havas hungarajn subtekstojn. Ĝi trovas nun en la retejo *Youtube* (ne scieblas kiel longe), sed miaj filmokaptaj programoj ne

kapablas fari uzeblan surdiskan sekurecan kopion. Mi estus danka, se iu povus helpi min kapti tiun filmeton kaj transformi ĝin en iun tradician filman formaton, kiel ekz. mpg. La filmeto troviĝas ĉe la adreso:

<http://www.youtube.com/adwords10?x=697ec85470264f719e70dc8bf3956db5>. Mi volus ekscii, ĉu estas aliaj esperantistoj-klientoj kiuj ricevas la saman/similan donacon de Google.

Szilvási Lázló

[szilvasi@eszperanto.hu](mailto:szilvasi@eszperanto.hu)

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

**Bulgario:** *Esperanta literatura konkurso* –

Hristo Gorov-Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Li verkis plurajn librojn, kiuj respegulas la pozitivan homajn trajtojn: solidarecon, batalon por la bono, strebon al honesta vivo.

La Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson, kiu okazos en ĉiu tria jaro. En la konkurso povos partopreni verkistoj, poetoj, ĵurnalistoj el ĉiuj landoj. La konkurso havos tri branĉojn: poezio, prozo, artikolo.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per du poemoj, originale verkitaj en Esperanto.

La noveloj devas esti ĝis 4-paĝaj kaj ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu novelo, originale verkita en Esperanto. La poemoj, noveloj kaj artikoloj devas esti komputile kompostitaj. Ili ne havu apartan temon. La artikoloj estu dediĉitaj al signifa Esperanta aranĝo.

La gajnintoj ricevos signifajn premiojn. La rezultoj estos anoncigitaj en la monato oktobro de 2012.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 1-a de septembro 2012 al la sekvanta retpoŝta adreso: [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg).

Georgi Mihalkov

Nadejhda V, bl. 529 vh A et. 9 ap. 33

Sofio – BG-1229 Bulgario

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

**Esperantio:** *Nova scienca revuo 'Teleskopo'* –

'Teleskopo' estas scienca revuo aperanta en interreto por publikigi en Esperanto artikolojn pri diversaj sciencaj fakoj, inkluzive ankaŭ de epistemologio, historio kaj filozofio kaj aliaj sciencaj branĉoj. La artikoloj estas elŝuteblaj tute senpage el la retejo de la revuo. Ĝis nun jam estis eldonitaj du numeroj, unu en la jaro 2009-a kaj unu en 2010, kaj nun ni kolektas artikolojn por la ĉi-jara eldono.

Jene skribas la ĉefredaktoro: "Saluton, kara Esperantistaro! Mi venas publike komuniki, ke la revuo [www.teleskopo.com](http://www.teleskopo.com) ricevas artikolojn por sia sekvanta eldono (marto 2011). Scienc-nivele verkitaj artikoloj estas bonvenaj! Legu la regulojn sur nia retpaĝo. La limdato estas la 1-a de marto. Bonvolu dissendi tiun mesaĝon al sciencistoj-esperantistoj! Ĉi tio estas la lasta alvoko por 2011! Amike,

S-ro Dominique Vieira, ĉefredaktoro."

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

**Hungario:** *Novaj podkasto kaj son-gazetoj* –

Ĉu vi ŝatas Esperantan muzikon? Ĉu vi volas aŭskulti kantojn sur la novaj esperantlingvaj sondiskoj? Tiam aŭskultu la programon de Radio Vinilkosmo, kiu estas ĝuebla ekde decembro kiel subkanalo de la Esperanto-TV ĉe: <http://esperanto-tv.com/vinilkosmo/>.

Kiel sciante, la 31-an de januaro estis ĉesigitaj la Esperantaj elsendoj de la pola ŝtata radio. La esperantlingvaj sonraportoj el Pollando tamen ne malaperis. Ja krom la podkasto de "Varsovia Vento" aperis eĉ novan sonprogramo, lanĉita por la fejsbuka grupo "Amikaro de la Pola Radio en Esperanto, APRE", danke al la persista laboro de Barbara Pietrzak kaj ŝiaj helpantoj. Feliĉe tiu interreta podkasto estas aŭskultebla kaj elŝutebla de iu ajn ĉe la adreso <http://retradio.posterous.com>.

Je la 11.01.2011 estis lanĉita la unua elsendo de la nova podkasto "Voĉo el Japanio" plimalpli semajne kompilata, kaj prizorgata de Salih Akirov. La podkasto okupiĝas ne nur pri japanaj politikaj kaj movadaj eventoj, sed ankaŭ pri kelkaj Esperantaj lingvaj aferoj. La "Voĉo el Japanio" estas elŝutebla ĉe la retejo <http://vej.posterous.com>.

(Ret-info, Eventoj, Hungario)

**Nia vasta, bunta mondo**

(*Onze wijde, bonte wereld*)

**Sinfordonado al pornografio**

(*Verslaving aan pornografie*)

En Usono pronografio ĉie ĉeestas en la interreto. Ĝi estis la unua granda interreta industrio kaj ankoraŭ estas la plej granda. Ĝia jara debito sumas je 13 miliardoj da dolaroj, kio estas pli ol la enspezoj de la pintaj teknologiaj kompanioj. *Acid Cow* publikigis raporton pri la eksterordinara sinfordonado al porno, kiu ŝajnas rapide disvastiĝi en Usono. Laŭ tiu raporto:

- ĉiu duona horo oni faras pornofilmon;

- 89% de la tuta pornografio estas produktata en Usono;
- 8% de ĉiuj retmesaĝoj estas pronografiaj;
- ĉiun sekundon 30.000 usonanoj rigardas pornografion;
- ĉirkaŭ 200.000 usonanoj fordonadas sin al pornografio, t.e. rigardas pli ol 11 horojn semajne, kaj 83% el ili estas viroj;
- regulaj pornorigardantoj seksumas trifoje pli ofte ekster sia geedzeco aŭ fiksa rilato;
- la duono de la pornorigardantoj perdas sian tutan intereson pri seksa interrilato.

Sinfordonado al pornografio havas jenajn negativajn sekvojn:

- 40% de la pornorigardantoj perdas sian edz(in)on;
- 58% da ili suferas konsiderindajn financajn perdojn;
- 35% da ili perdas sian laboron;
- sinfordonado al pornografio kreskigas la geedzegan malfidelecon per 300%;
- 56% de ĉiuj divorcokazoj rilatas al unu persono havanta obsedan intereson pri pornografio;
- grava klinika deprimito okazas dufoje pli ofte ĉe regulaj pornorigardantoj.

Konkludo: fordonado al pronografio povas detrui ies personan ekvilibrecon kaj feliĉecon, kiel jam multaj (35%) el ili konfesas.

*(Interreto)*

### **La magneta norda poluso translokiĝas.**

*(De magnetische noordpool verplaatst zich.)*

Rezultatoj de sciencaj esploroj pravas, ke la magneta norda poluso de la tero rapidas al Siberio je preskaŭ 25 mejloj (40 km) ĉiujare, kio estas imputenda al magnetaj ŝanĝiĝoj en la kerno de nia planedo.

Geologoj supozas, ke la kerno de la tero konsistas el solida fera centro ĉirkaŭita de rapide fluantaj fluidaj metaloj. Tio funkcias kiel dinamamo, kiu kreas la magnetan kampon de la tero.

Tiu magneta kampo etendiĝas milojn da kilometroj en la spacon kaj protektas la teron kontraŭ la suna vento, potenca malutila torento de ŝargitaj partikloj emanantaj de la suno.

La sciencistoj kredas, ke ŝanĝiĝoj en tiu magnetismo povus kaŭzi translokiĝon de la magneta nordo. Sed neniu scias, ĉu iutage alia ŝanĝiĝo en la kerno povus sendi la magnetan nordon en alian direkton. Malkiel la statika kampo ĉirkaŭ ordinara dinamamo, tiu de la tero daŭre ŝanĝas sian direkton. Jam antaŭ jarcentoj navigistoj malkovris, ke la norda direkto sur kompasoj leĝere diversis depende de la loko.

Sed nova studo de jarcentaj loglibroj ankaŭ malkaŝas, ke la termagnetismo plimalfortiĝas. Ekde 1840, kiam unuafoje ĝustaj mezuradoj estis faritaj, la forto de la kampo malpliĝas je 5% ĉiun jarcenton. Se tiu tendenco daŭrus, la magneta kampo povus malaperi kaj inversigi la polusojn: nordo fariĝus sudo kaj inverse, la tero ektorniĝus de oriente okcidenten, kaj la suno leviĝus en okcidento! Ke tio jam okazis en la pasinteco pravas magnetaj ŝtonoj. Sed tio kaŭzus senegalan katastrofon! *(Interreto)*

### **La suno leviĝas tro frue en la nordaj landoj.**

*(De zon komt te vroeg op in het noorden)*

Ĉiu konas la fenomenon, ke supre de la polusa cirklo la suno ne brilas en vintro, kaj ne subiras en somero. Tion kaŭzas la oblikva pozicio de la terakso.

En Gronlando la suno leviĝis du tagojn tro frue ĉi-jare kaj tiel metis la sciencistojn antaŭ enigmon. Unuafoje en la historio de la plej norda urbo Ilulissat la suno aperis super la horizonto jam la 13-an de januaro.

La sciencistoj konfirmas, ke ili daŭre observas la pozicion de la terakso kaj la rotacion de la tero, kaj ke ili ne konstatis ŝanĝiĝojn. Kiel fidindaj estas tiuj asertoj? Jam en 2010 NASA demonstris, ke la tero povas turniĝi pli rapide sub la influo de ekzemple forta tertremo.

Oni ankaŭ sugestis, ke la tro frua sunleviĝo povus havi astronomian kaŭzon. Sed Wolfgang Lenhart de la geofizika departemento de la *Zentralanstalt für Meteorologie und Geodynamik* (Centra Instituto por Meteorologio kaj Geofiziko) de Vieno deklaris, ke la pozicio de la stelaroj ne ŝanĝiĝis, kaj ke do la frua sunleviĝo ne povas havi geofizikajn aŭ astronomiajn kaŭzojn.

Verŝajne tion kaŭzis la fakto, ke la magneta norda poluso de la tero iom-post-iome moviĝas al Ruslando.

La usona *Federal Aviation Administration* (Federa Aviada Administracio) serioze konsideris tiun fakton kaj jam fermis unu aeroportan por adapti la sorejojn kaj surteriĝejojn.

Sur aliaj lokoj de la tero la sama bildo videbliĝas. Tiel ekzemple la kanadaj inuitoj (eski-moj) vidas, ke la suno iam kaj iam leviĝas en aliaj momentoj, ol en tiuj al kiuj ili kutimas.

*(Interreto)*

### **Birdoj amase falas el la ĉielo.**

*(Vogels vallen massaal uit de hemel.)*

Kaŭze de la varmiĝo de la tero permafrostoj en la nordo de Kanado kaj Siberio komencis

malfrosti, kio kaŭzas la emanadon de metano, venena, kaj do danĝera gaso por bestoj kaj homoj. Ĉu ekzistas rilato inter tiu emanado de metano kaj la amasa morto de birdoj kaj fiŝoj? Malgrandaj bestoj estas tre sentemaj. Estas sciite, ke metano povas mortigi birdojn. Tiel oni uzas kanariojn por malkovri gason en min-galeriojn aŭ la ĉeston de metano en la aero.

Mondvaste oni raportis, ke amasoj da sen-vivaj birdoj falis el la ĉielo, kaj amasoj da mortintaj marbestoj alboridiĝis.

La mistera morto de miloj da birdoj kaj fiŝoj ne limiĝas je Usono. En januaro inter 50 kaj 100 birdoj falis sur aŭtovojon en Svedio. En la brazila Paraná antaŭnelonge alboridiĝis pli ol cent tunoj da fiŝoj. En Arkansaso (Usono) oni trovis pli ol 5000 mortintajn birdojn sur erao de nur 2,4 kvadrataj kilometroj. Sur la bordo de la angla insulo Thant oni trovis pli ol 40.000 krabojn kaj aliajn marbestojn. Apud la itala Faenza oni plukis pli 300 kolombojn de la grundo. Ktp. Temas pri mond vasta fenomeno.

Kaj niaj dombestoj? Metano povas kaŭzi, ke via hundo bojas tage kaj nokte sen ia kaŭzo, kaj ke via kato kondutas strange. Homoj sentas vertiĝon aŭ malekvilibrecon.

Sed ĉu tio povas ankaŭ ekspliki la amasan morton de fiŝoj? Fiŝoj same tiel facile sentas ŝanĝojn en la akvo, kiel birdoj en la aero, kiel ĉiu posedanto de akvariumo povas konstati. Se benko de fiŝoj estas kaptita per suprenirantaj metanobeloj, la fiŝoj mortas.

(*Interreto*)

## **Intervjuo de denaskulino**

*(Interview van een vrouw die vanaf haar geboorte Esperanto sprek)*

Oni taksas la nombron de la denaskaj Esperanto-geparolantoj en la mondo je ĉirkaŭ mil personoj. Eblas do lerni Esperanton kiel oni lernas nacian lingvon. Tio pruvas, ke tiurilate Esperanto estas tute normala lingvo.

Instrui Esperanton al tre junaj infanoj povas okazi pro du kaŭzoj. Pro neceso, kiam du esperantistoj, parolantaj diversajn naciajn lingvojn, geedziĝas kaj povas kompreni sin nur per Esperanto. Aŭ tio povas okazi pro idealismo. Tiel la gepatroj de Nija Melnikova – Valentin Melnikov kaj Svetlana Ĵuba – ambaŭ rusoj, parolantaj la rusan kaj loĝantaj en Moskvo, decidis eduki sian filinon nur en Esperanto. Ŝi neniam aŭdis eĉ ne unu rusan vorton el iliaj buŝoj. Sed la geavoj kaj aliaj parencoj parolis la rusan, kaj ankaŭ surstrate ŝi aŭdis la rusan,

kiun ŝi poste lernis en la infanĝardeno kaj la lernejo.

Sed kion opinias Nija Vus Melnikova mem nun kiel 25-jara plenkreskulino pri tiu decido de siaj gepatroj? Nun ŝi havas propran familion en Kievo. La tiea E-movado stagnas kaj fakte ne interesas ŝin. Ŝi tamen plurfoje renkontas eksterlandajn gastojn, kiujn ŝi gvidas tra la urbo. Ŝi havas do neniun kun kiu ŝi povus regule paroli en Esperanto, kaj do forgesis iujn vortojn.



Jena intervjuo okazis antaŭ unu jaro.

- *Kiu el la gepatroj instruis al vi Esperanton?*
- Ambaŭ. Ili simple parolis kun mi Esperante.
- *Ĉu via patro aŭ patrino alparolis vin ĉiam ekskluzive en Esperanto aŭ fojfoje uzis ankaŭ la rusan lingvon?*
- Ili ĉiam parolis nur Esperante.
- *Ĉu vi kontaktis aliajn plenkreskajn esperantistojn, estante infano?*
- Mi eĉ instruis iom. Demandu mian patron pri la tendaroj.
- *Kiam vi ekkonsciis, ke vi parolas lingvon alian ol la rusan, kaj kiamaniere vi klarigis tion al vi mem? Kiajn sentojn vi havis ĉe tio?*
- Esperanto estis mia unua lingvo. Dujara mi jam trankvile tradukis de Esperanto al la rusa kaj reen (tion rakontis al mi la gepatroj). Do por mi ambaŭ lingvoj estis tute naturaj.
- *Ĉu vi iam havis la deziron paroli ruse kun la esperantiganta patr(in)o? Kial?*
- Jes, nun, estante 25-jara. Por mi nun estas malfacile paroli en Esperanto. Mi multon forgesis, kaj ĝi jam, verdire, tedis min.

- Ĉu vi konas aŭ memoras iujn infanajn esperantlingvajn kantojn, versaĵojn, fabelojn? Ĉu la gepatroj instruis tion al vi?

- Jes, mi havas multe da Esperanto-libretoj por infanoj. Fabelojn mi jam preskaŭ ne memoras.

- En kiu aĝo vi komencis legi en Esperanto? Kion nome vi tiam legis?

- Nu, kiam oni ĝenerale komencas legi. Ŝajnas, ke en la aĝo de 5-6 jaroj.

- Ĉu vi povas rememori viajn infanajn ruslingvajn diraĵojn, en kiujn vi enplektis Esperantajn vorton aŭ sintaksajn konstruaĵojn?

- Mia patro memoras, sed mi jam ne.

- Ĉu vi ofte sentis mankon de adekvataj Esperantaj vortoj en la ĉiutaga lingvouzado? Ĉu estis okazoj, kie vi mem inventis bezonatajn Esperanto-vortojn sen helpo de la gepatroj?

- Iam.

- Ĉu vi memoras, ĉu kaj kiel la rusa lingvo malhelpis al vi paroli Esperante? Kion konkrete vi memoras?

- Mi ofte miksis la vortojn kaj malkontentis pri tio.

- Ĉu la kono de Esperanto helpis vin lerni aliajn lingvojn?

- Jes, verŝajne.

- Kiom da fremdaj lingvoj vi nun posedas?

- La anglan, pli-malpli la polan, iomete la germanan, iomete la japanan.

- Kiamaniere vi ĝuas Esperanton kompare al viaj samaĝaj esperantistoj?

- Neniel.

- Ĉu vi jam proponis al viaj geamikoj lerni Esperanton? Kiel ili reeĥis?

- Mi iom timis fari tion. Kaj ili demandis: 'Por kiu celo?'

- Ĉu vi iam sentis konsterniĝon, kontaktante plenkreskulon, malbone posedantan Esperanton?

- Ne, mi ilin kutime korektis.

- Ĉu vi iam sentis ĝenon, parolante kun esperantisto, kiu, ne estante denaskulo, posedas la lingvon pli bone ol vi?

- Iomete.

- En kiu aĝo okazis via unua partopreno en Esperanto-aranĝoj? Kiujn vi partoprenis en infana aĝo? Kiujn en la lerneja aĝo?

- Bonvolu demandi mian patron. Tion mi ne memoras.

- Ĉu vi, en lerneja aĝo, korespondis kun aliaj esperantistoj?

- Malofte.

- Kio helpis (aŭ malhelpis) vin resti nur Esperanto-parolantino, sed ankaŭ esperantistino (ja multaj denaskuloj ne iĝis esperantistoj)?

Ĉu kontaktoj kun Esperanto-klubo, Esperantomovado, partopreno en Esperanto-aranĝoj?

- Ne ofendiĝu. Nenio. Esperanto jam delonge tedis min. Tio estis revo, fantazio de miaj gepatroj – havi denaskan esperantistinon, sed ne la mia propra. Mia vivo estas nun tute alia. Esperanton mi preskaŭ ne bezonas, kaj mi havas aliajn interesojn. Bedaŭrinde aŭ felice. Esperanton mi preskaŭ tute forgesis.

- Ĉu laŭ vi estus utile, ke denaskuloj unuigu en aparta komunumo (asocio, virtuala klubo, speciala retpaĝo aŭ forumo)?

- Eble estus interese interparoli kun aliaj denaskuloj, ekscii ion pri ilia sperto.

(*El REGO, la rusa Esperanto-gazeto, N-ro 4 (59), aŭgusto 2010*)

### **Nia rakonto: Modela milionulo (1)** (*Ons verhaal: Een modelmiljonair*) (1)

Se oni ne estas riĉa, ne utilas esti ĉarmulo. Romanco estas la privilegio de la riĉuloj, ne la okupo de senlaborulo. Malriĉuloj devas esti praktikaj kaj prozecaj. Estas pli bone havi daŭrajn enspezojn ol esti fascina. Tio estas la grandaj veroj de la moderna vivo, kiujn Hughie ['ju:] Erskine neniam realigis. Povra Hughie! Intelekte, ni devas koncedi, li ne multe gravis. Li neniam diris brilan aŭ eĉ malican vorton en sia vivo. Sed male li estis mirige bela, kun siaj brunaj bukraj haroj, sia pure desegnita profilo kaj siaj grizaj okuloj. Li estis populara tiel ĉe la viroj kiel ĉe la virinoj, kaj li havis ĉiun talenton, escepte la talenton gajni monon. Lia patro postlasis al li sian kavaliran sablon kaj ian "Historion de la Duoninsularo" en dek kvin volumoj. Hughie pendigis la unuan super sia spigulo, metis la duan sur bretaron inter "Ruff's Guide" kaj "Bailey's Magazine", kaj

vivis per la ducent pundoj kiujn maljuna onklino ĉiujare donacis al li. Li provis ĉion, iris al la borso dum ses monatoj, sed kion povis fari papiliono inter virbovoj kaj ursoj? Li estis tekomercisto dum iom pli da tempo, sed lin baldaŭ tedis pekua kaj suĉongo<sup>1</sup>. Tiam li provis vendi sekan ŝereon. Sed tio malsukcesis, ĉar la ŝereo estis iom tro seka. Fine li fariĝis nenio alia ol ĉarma, sensukcesa juna viro kun perfekta profilo kaj sen profesio.

Por kompletigi la malfeliĉon li enamiĝis. La knabino kiun li amis, estis Laura Merton, la filino de pensiita kolonelo, kiu perdis sian bonan humoron kaj digeston en Hindio kaj neniam plu retrovis ilin. Laura adoris Hughie, kaj li estis preti kisi ŝiajn ŝulaĉojn. Ili estis la plej bela paro en Londono kaj kune posedis nenian pencon. La kolonelo multe ŝatis Hughie, sed rifuzis konsenti pri gefianĉiĝo.

“Venu al mi, mia knabo, kiam vi havos dek mil proprajn pundojn, kaj ni reregardos la aferon,” li diris, kaj Hughie aspektis tre sombra en tiuj tagoj kaj iris al Laura por konsolo.

Iun matenon, kiam li estis survoje al Holland Park, kie loĝis la Merton-oj, li eniris la domon de lia granda amiko Alan Trevor. Trevor estis pentristo. Efektive, malmulte da homo eskapas al tio nuntempe. Sed li ankaŭ estis artisto, kaj artistoj estas sufiĉe maloftaj. Persone li estis stranga krudulo kun ruĝaj makuletoj sur la vizaĝo kaj ruĝa vila barbo. Tamen, kiam li prenis sian penikon, li estis vera majstro, kaj liaj pentraĵoj estis avide serĉataj. Komence Hughie forte allogis lin, oni devas agnoski tion, tute per sia persona ĉarmo. “La solaj homoj kiujn pentristo devas koni,” li ofte diris, “estas belaj, stultaj homoj, kiuj donas plezuron al artisto, kiam li rigardas ilin, kaj intelektan ripozon, kiam li parolas al ili. Viroj kiuj estas dandoj, kaj virinoj kiuj estas amindulinoj regas la mondon, aŭ almenaŭ devus fari tion.” Iel ajn, pli bone ekkoninte Hughie, li ŝatis lin same multe pro lia brila, viveca stilo kaj malavara, trorskema naturo, kaj permesis lin daŭre libere eniri sian studion.

Kiam Hughie eniris, li trovis Trevor faranta la lastajn alĝustigojn al mirige bela naturgranda portreto de almozulo. La almozulo mem staris sur sufiĉe alta platformo en angulo de la studio. Li estis ŝrumpinta maljunulo kun flava vizaĝo kiel tre malnova pergameno kaj kompatinda mieno. Sur liajn ŝultrojn estis ĵetita raspeca, bruna mantelo plena je ŝiroj kaj truoj.

<sup>1</sup> Specoj de teo (neol.).

*Met de groeten van*

## **KBC Bank Hechtel**

Rode Kruisplein 5

3940 Hechtel

Tel. 011-73.02.20

Fax 011-73.02.21

[hechtel@kbc.be](mailto:hechtel@kbc.be)

Liaj dikaj ŝuoj estis plurfoje flikitaj, kaj per unu mano li apogis sin sur malglata bastono, dum per la alia mano li etendis sian molfeltan ĉapelon por almozoj.

“Kia miriga modelo!” flustris Hughie, kiam li premis la manon de sia amiko.

“Ĉu miriga modelo?” ekkriis Trevor. “Certe li estas! Tiajn almozulojn kia li estas, oni ne renkontas ĉiutage. Vera trovaĵo, amiko, ia viva Velasquez! Granda ĉielo! Kian pentraĵon Rembrandt estus farinta de li!”

“Povra maljunulo!” diris Hughie. “Kiel kompatinda li aspektas! Sed mi supozas, ke por vi, pentristoj, lia vizaĝo estas lia riĉaĵo!”

“Certe,” respondis Trevor, “vi ne deziras, ke almozulo aspektu feliĉa, ĉu?”

“Kiom la modelo ricevas pro sia pozado?” demandis Hughie, trovante komfortan sidejon sur divano.

“Ŝilingo por unu horo.”

“Kaj kiom vi ricevos por tiu ĉi pentraĵo?”

“Ho, por tiu ĉi mi ricevos du mil.”

“Ĉu pundojn?”

“Gineojn. Pentristoj, poetoj kaj kuracistoj ĉiam ricevas gineojn<sup>1</sup>.”

“Nu, mi opinias, ke la modelo devus ricevi procenton,” ekkriis Hughie, ridante. “Li laboras tiel dure kiel vi.”

“Sensencaĵo, sensencaĵo! Konsideru nur la penadon surmeti la farbon de pentristo, kiu staradas la tutan tagon apud sia stablo! Estas facile por vi, Hughie, tiel paroli, sed mi certigas vin, ke arto preskaŭ atingas la dignecon de mana laboro. Sed ne tiom babilu: mi estas tre okupata. Fumu cigaredon kaj silentu.”

Post iom da tempo la servisto eniris kaj diris al Trevor, ke la kadrato deziris paroli al li.

<sup>1</sup> Historia ora monero valoranta 21 ŝilingojn, dum pundo valoris 20 ŝilingojn..



“Ne forkuru, Hughie,” li diris, dum li eliris, “mi revenos post momento.”

La maljuna almozulo profitis de la foresto de Trevor, ripozante momenton sur ligna benko, kiu staris malantaŭ li. Li aspektis tiel mal-espera kaj mizera, ke Hughie ekkompatis lin kaj palpis en sia poŝo, kiom da mono li havis. Li trovis nur suverenon<sup>1</sup> kaj kelkajn kuprajn monerojn. “Povra maljunulo,” li pensis, “li bezonas la monon pli ol mi, sed tio signifos, ke mi ne povos uzi veturilon dum du semajnoj.” Kaj li iris tra la studion kaj metis la suverenon en la manon de la almozulo.



Oscar Wilde (1854-1900)

La maljunulo ektimis, kaj leĝera rideto glitis sur liaj ŝrumpintaj lipoj.

“Dankon, sinjoro,” li diris, “dankon.”

Tiam Trevor revenis, kaj Hughie adiaŭis lin, iomete ruĝiĝante pro tio kion li ĵus faris. Li pasigis la tagon kun Laura, ricevis ĉarman skoldon pro lia ekstravaganco kaj devis piediri hejmen.

Tiun nokton ĉirkaŭ la dek-unua li promenis al la Palette Club kaj trovis Trevor sidanta sola en la fumĉambro kaj trinkanta vinon kaj mineralan akvon.

“Nu, Alan, ĉu vi povis fini la pentraĵon?” li demandis, bruligante cigaredon.

“Finis kaj kadrus, mia knabo!” Trevor respondis. “Kaj, preterpase dirite: vi faris veran konkeron. La maljunulo kiun vi vidis ĉe mi, vere ekŝatis vin. Mi devis rakonti ĉion pri vi al li – kiu vi estas, kie vi loĝas, kian enspezon vi havas, kiajn prospektojn vi havas – .”

<sup>1</sup> Ora monero valoranta 1 pundon.

“Kara Alan,” ekkriis Hughie, “versajne mi trovos lin atendanta min ĉe mia pordo, kiam mi reiros hejmen. Sed vi certe ŝercas. Kia povra mizerulo! Mi volus, ke mi povu fari ion por li. Mi pensas, ke estas terure esti tiel mizera. Mi havas amason da malnovaj vestaĵoj hejme. Ĉu vi kredas, ke li akceptos kelkajn el ili? Liaj ĉifonoj dispeciĝis!”  
(*daŭrigota*)  
(Oscar Wilde, trad. P.J.D.)

## Limburga Esperanto-Asocio

### Aktivaĵoj en marto kaj aprilo 2011:

#### Ĵaŭdon, la 31-an de marto: Kantovespero.

Ĉar la literoj de la kantoj en la kantaro estas ofte tre malgrandaj, Jan kaj Paul faris fasketon en la formato A4 kun 13 kantojn en grandaj literoj. Ili aldonis du kantojn, kiuj ne troviĝas en la kantaro: *Kampinland'* (J. Doumen- A. Preud'homme) kaj *Mi amas vin* (R. Sproelants + J. Doumen – Noordkaap-Monza). Paul akompanis la kantojn sur sia gitaro. Krome li kantis sole tri kantojn: *Kiel vi povas diri*, *Ĉiuj floroj*, *Dona Dona*. Bedaŭrinde nur kvin, sed tre entuziasmaj membroj de LEA partoprenis en la kantado.

#### Ĵaŭdon, la 28-an de aprilo: Vortludo.

Ĉar Henri Schutters forestis pro okulooperacio, de kiu li bone resaniĝas, Jan gvidis la ludon, kiu konsistas el tio, ke laŭvice la ludantoj divenas unu literon de donita vorto. Se iu trafas bonan literon, li povas denove diveni. La persono kiu divenas la plej grandan nombron da literoj, gajnas la ludon. Ĉeestis kvin membroj. La gajninto de la vespero estis Ben Indestege.

### Aktivaĵoj en majo kaj junio 2011

Ĵaŭdon, la 26-an de majo: Promenado tra Peer aŭ vizito kun ĉiĉ'rono al la muzeo Brueghel en Peer, kie daŭre estas ekspoziciataj reproduktaĵoj de ĉiuj pentraĵoj en originala grandeco de Pieter Brueghel la Maljuna.

Ĵaŭdon, la 30-a, de junio: Por fermi la Esperantan laborjaron 2010-2011 ni ludos petankon (globetludon) sur la petankotereno en la ĝardeno de Jan Doumen, kiu loĝas je Peerderbaan 81, 3940 Hechtel. Se vi havas petankopilkojn, alportu ilin. Jan mem disponas pri 18 pilkoj.

Ĉiuj membroj de LEA kaj aliaj esperantistoj estas tutkore bonvenaj al niaj aktivaĵoj!

